

“Kio tio estas pri *twinklo*?” la Reĝo demandis.  
 “Ĝi komenciĝis per la Te—” diris la Ĉapelisto.

“Kompreneble ‘*twinklo*’ komenciĝas per T” diris vikle la Reĝo. Ĉu vi volas insulti min kredigante ke mi estas neklerulo? — vi daŭrigu!”

— “Mi estas malriĉulo” la Ĉapelisto rekomencis “kaj preskaŭ ĉio pli malpli *twinklis* post la teo, sed la Martleporo diris—”

“Mi *ne* diris” la Martleporo rapide intermetis.

“Vi *diris*—” insistis la Ĉapelisto.

“Mi tion neas” diris la Martleporo.

“Li neas ‘tion’” diris la Reĝo, “do ellasu ‘tion’ el la evidenco.”

“Nu, se ne la Martleporo, certe la Gliro diris—” kaj la Ĉapelisto ĉirkaŭregardis por vidi ĉu ankaŭ li neas—sed la Gliro nenion neis, ĉar li profunde endormiĝis.

“Kaj poste” la Ĉapelisto daŭrigis “mi tranĉis pli da buterpano—”

“Sed kion la Gliro diris?” demandis unu ĵurinto.

“Tion mi ne povas memori” respondis la Ĉapelisto.

“Se vi ne memoros” minacis la Reĝo “mi ekzekutigos vin.”

La kompatinda Ĉapelisto lasis fali la tetason

kaj buterpanon, kaj humile surgesis nove jam la trian fojon, li komencis

“Mi—se plaĉas al via Reĝa M— tre malriĉa—”

“Konsente, tre malriĉa vi estas larto” diris la Reĝo “ĝin vi certe ne

Ĉe tiu reĝa ŝerco, unu kobajo al estis tuj subpremita de la ofici ‘subpremita’ estas iom malfacila volas klarigi la agmanieron. Oni juĝejo grandan kanvassakon, kur la buŝo per ŝnuretoj. En tiun sak la kobajon, kaj poste sidis sur la sa

“Estas bona afero ke mi vidis t Alicio. “Tre ofte mi legas en la ĉe la fino de iu proceso ‘kell ekaplaŭdis, sed la aplaŭdantoj es premitaj de la oficistoj de la juĝe nun neniam mi povis kompreni tio signifas.”

“Se nenion plu vi povas diri p diris la Reĝo “estas permesite al v

“Mi ja ne povas” kontraŭdiris deiri pli malsupren, ĉar jam mi planko.”

“Tamen vi povas *decidi desidi* t la Reĝo.

Ĉe tio la alia kobajo aplaŭc subpremita.